

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Martin Ginette

[SAULXURES/MOSELOTTE, Francio]

2001

kiel Sabira Stalberg, redaktoro de KONTAKTO iĝis esperantisto
— literatur-historiaj paĝoj — fabeloj de diversaj popoloj —
enigmoj — rimaro — aforismoj — anekdotoj — anoncetoj —
informoj — korespondu!

6

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasília (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG.

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Franolo ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio
Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lázaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Bildo de Martin Ginette al la temo "Ni lernu Esperanton" salutas vin ĉe la kovrilo.

La gasto de la tria paĝo Sabira Ståhlberg, redaktoro de la junulara revuo KONTAKTO, tre interese rakontas pri sia agado.

La franca skolo en E-literaturo — la plej eminentaj aŭtoroj.

Popolaj fabeloj el diversaj landoj kaj epokoj.

La plena paĝo de interesaj enigmoj, de simplaj ĝis komplikaj. Ni daŭre publikigas la rimaron de B. Thorne kaj provojn el ĝi.

Aforismoj kaj anekdotoj najbaras sur la 10-11 paĝoj. Anoncoj, adresoj tradicias ĉe la malantaŭa kovrilo.

Venis tempo aboni KOMENCANTOn por 2002.

KOMENCANTO-2002 - novaj temoj kaj direktoj, nova ekstera aspekto, 16 paĝoj en ĉiu kajero...

Ni kredas, ke vi, karaj amikoj, restos fidelaj al "K" kaj kunatitoros en nia gazeto en la sekva jaro.

Agrablan legadon!

Viaj DONACOJ por KOMENCANTO estas ĉiam bonvenaj!

KOMENCANTO

2001 numero 6 // 8 numeroj jare

regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto: let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo: 100 rublej (za 6 nomerov v god) prostym poĉtovym perevodom na imja Kudrjavceva Viktora Vasильeviča:

620041, Ekaterinburg, a. ja. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menci i KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Kiel tio komenciĝis

Sabira Ståhlberg

redaktorino de la junulara gazeto KONTAKTO

Esperanto estas por mi mondo egala al ĉiuj aliaj mondoj

Karaj amikoj! Gasto de nia paĝo estas konata esperantistino, aktiva membro kaj estrarano de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, redaktorino de la junulara gazeto KONTAKTO Sabira Ståhlberg.



Unuafoje mi eksciis pri Esperanto per televido. Okazis en Finnlando Internacia Junulara Kongreso en 1980, kaj la nacia televido elsendis programon pri la JJK. Mi tiam estis tre maigranda kaj ne multon komprenis, sed mi memoras klare pri la stranguloj. Jes, tiel mi vidis la esperantistojn! Stranguloj, kiuj volas plibonigi la mondon.

Konatiĝo kaj elektiĝo

Kelkajn jarojn pli poste, kiam mi estis 13-14-jara, mia patrino alportis lernolibron pri Esperanto, kiun ŝi hazarde trovis en iu librovendejo. Tiel ni komencis lerni, unue pro amuziĝo. Lernis la patrino, mia fratino kaj mi. Tiam ni ankoraŭ ne pensis pri aliaj homoj, kiuj eble parolas la lingvon. Estis tre facila lernado, ni ne bezonis longan tempon antaŭ ol elparoli. Ankau la ideoj pri internacieco kaj egaleco jam estis proksimaj al ni. Ni senpene konatiĝis kun Esperanto kaj trovis ĝin rapide tre natura afero en la vivo.

Kiam ni finis la lernolibron, mia patrino trovis, ke ekzistas Esperanto-klubo en nia urbo. Ni iris tien por vidi kiel aspektas la homoj, kiuj parolas tiun lingvon. Estis nur mal-

junuloj tie!!! Ni estis ŝokitaj, kaj mi poste rifuzis iri al la klubo. Nur iam poste mi instigite de mia patrino iris al la jarkunveno de la junulara organizo. Junulara organizo... ankaŭ tie regis la pli aĝaj, ĉar post la JJK la finnlanda junulara movado ne sukcesis havigi al si novajn fortojn. Ĉeestis tri personoj, el kiuj du estis jam super la aĝlimo.

Tiel okazis, ke en la unua kunveno mi elektiĝis vicprezidanto de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo. Mi malfacile neas al proponoj, kaj tiel mi komencis agi. Mi ne multon sciis, sed en la sama jaro mi iris al JUK, kaj tie lernis. Mi pensas, ke tiu unua JUK min kaptis. Ĉar tie min impresis, ke eblis paroli kun tiom da homoj el tiom da landoj. Tiom facile! Tiom senĝene! Kompreneble ekzistis ankaŭ multaj stranguloj. Sed la amikoj, kun kiuj mi konatiĝis tie, estis pli gravaj.

Realeco kaj imagoj

Kiam mi komencis agadi, oni multe promesis al mi pri la facileco de Esperanto, pri la Fina Venko kaj mi ne plu scias kio. Mi ja lernis la lingvon rapide, sed mi malfacile glutis la idealojn. Mi ne estas idealisma homo. Mi estas praktikema. Tial min ne interesis mitoj kaj belaj movadaj fabeloj, sed mi koncentriĝis pri konkreta agado. La realecon de Esperantio mi malkovris iom post iom, en Eŭropo, en Azio. Tiam eĉ pli malfacile mi komprenis la mitojn kaj ankaŭ la dubojn pri Esperanto, kiujn havis eksteruloj. Mi ja spertis mem diversmaniere la funkcion de Esperanto, kiun parolas homoj en la tuta mondo.

Kiel prezidanto de FEJO mi fine de la 80-aj jaroj partoprenis en kelkaj protestoj kontraŭ TEJO. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Mi forte kritikis TEJO pro mistraktado de ĝiaj landaj Sekcioj kaj

pro malĝusta politiko. Sed kio okazis? Kelkajn jarojn pli poste la homo, al kiu mi plej akre protestis, proponis al mi eniri la estraron de TEJO! Mi pripensis longe, kaj diris fine jes. Eble, mi pensis, mi povos ion ŝanĝi. Tiel mi fariĝis vicprezidanto de TEJO kaj okupiĝis pri ĝiaj eksteraj rilatoj. Dum preskaŭ dek jaroj mi estis iel ligita al TEJO kaj mi ege multe lernis, persone kaj movade, pere de mia aktivado en ĝi.

Novaj vojoj

Nun venis por mi la tempo forlasi TEJO, ĉar estas novaj fortoj kaj novaj homoj, kiuj tre kapable gvidas la organizon. Ne plu mi povus akuzi TEJO pro misa politiko... Nuntempe ĝi aŭskultas siajn Landajn Sekciojn kaj realisme agas. Mi povas jam koncentriĝi pri novaj vojoj. Mi interesiĝas pri kulturo en Esperanto kaj ĝia disvolvado - lastatempe mi en Esperanto verkas (eldoniĝis jam du miaj libroj, "Malantaŭ la muro" kaj "Durankulak"), teatrumas, prelegas, vojaĝas, trejnas, eldonas.... Estas spertoriĉa vivo, kun multaj defioj kaj interesaj okazaĵoj. Pleje al mi plaĉas ĉiuj interesaj homoj, kiujn mi renkontas tra la mondo.

Esperanto por mi estas lingvo egala al ĉiu alia, kiun mi uzas, kaj mi strebas en ĉiuj lingvoj fari same kvalitatajn aferojn. Esperanto estas por mi mondo egala al ĉiuj aliaj mondoj, en kiuj mi vivas. Esperanto estas natura parto de mia vivo, tiel natura, ke mi nun pensas, ke "la komenco" ne okazis kiam mi ekkonis la lingvon. La komenco estis jam multe pli frue en mia vivo. La konatiĝo kun Esperanto estis fazo en la persona evoluprocezo, kiu daŭros la tutan vivon.

La 2-a periodo de esperanta literaturo

La franca skolo

Karaj amikoj!

Ni daŭrigas prilumi la duan periodon de E-literaturo kaj nun prezentas al vi aŭtorojn de la franca skolo.

La franca movado efikis al la lingvo kaj literaturo de Esperanto inter la du mondmilitoj precipe per sekvaj personoj: Theophile Cart, kiu estis la prezidanto de la Akademio ĝis sia morto en 1931, Grosjean-Maupin kaj Gaston Waringhien, kiuj estis grandaj leksikologoj de Esperanto, kaj per rimarkinda verkisto Rajmond Schwartz.

Theophile Cart

La efiko de Th. Cart montriĝis ĉefe en la batalo kontraŭ neologismoj. La batalo estis tre akra kaj de Cart ĝi estis gvidita kiel defendo de la Fundamento. Theophile Cart - franca profesoro; naskiĝis en 1895 en Saint-Antoine. Li faris superajn studojn en Basel, Berlin, Roma kaj Paris. Th. Cart estis rimarkinda lingvisto, scipovis sep lingvojn, instruis francan beletristikon ĉe Upsala Universitato en Svedujo (1891-92), estis profesoro en Liceo de Henri la 4-a (1892-1921) kaj prezidanto de lingvistika societo en Paris. Th. Cart esperantiĝis en 1901, tuj komencis gvidi diversajn kursojn kaj publikigis lernolibrojn pri E-to.

Nelacigebla propagandisto, li skribis en multaj E-gazetoj kaj dum tridek jaroj propagandis kaj batalis por Esperanto.

Jam en 1903 li komencis sian porblindulan agadon, ĉar konsciis, ke internacia lingvo povas iom mildigi la teruran izolecon de ĉiulandaj blinduloj; li kreis la brajlan gazeton Esperanta Ligilo (1904).

Th. Cart verkis multajn lernolibrojn, el kiuj "Plena klasika libro" (1912), "Esperanta radikaro"

(1906), "Biletoj al Blankbarbulo" (1913-17), "Vortoj de Prof. Cart" (1927), "Pri landnomoj" (1927). Liaj libroj estis tradukitaj en multajn lingvojn.

Dum la kriza tempo 1907-1908, kiam la apero de Ido (*) minacis disigi la esperantistojn kaj ruinigi la movadon, Cart metis sian tutan energion, fortojn kaj kapablojn al la kontraŭbatalo de la skismo kaj sukcesis. De tiu tempo kaj poste, kiel prezidanto de la Akademio, li senĉese batalis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo, kiu ne estus la rezultato de natura evoluo. "Ni fosu nian sulkon" - konsilis li kaj tio signifis: "Ni laboru, restante fidelaj al nia sensanĝa Fundamento". Li mem restis fidela al Esperanto ĝis sia morto.

Th. Cart nelonge antaŭ sia morto, skribis en la epilogo de sia libro "Vortoj de Prof. Cart": "En tiu ĉi kvazaŭtestamento mi deziras enskribi ankaŭ la nomon de mia kolego profesoro Grosjean-Maupin, kiu de la komenco de mia prezidanteco pli ol iu ajn faciligis mian Akademian agadon".

Emile Grosjean-Maupin

Emile Grosjean-Maupin, franco, licea profesoro, okupiĝis ĉiam kaj preskaŭ ekskluzive pri lingvaj demandoj. Li naskiĝis 19 feb 1863 en Nancy. Esperantiĝis en 1906. Konstanta redaktoro de "Franca Esperantisto" dum ĝia tuta ekzistado (1908-1921). Lia granda aŭdaco estis en 1910 la redakto de Esperanta-franca vortaro. Ekde 1920 ĝis sia morto li estis la direktoro de la sekcio pri komuna vortaro en la Lingva Komitato, do, kiel skribis pri li K. Kalocsay, li fariĝis la "Vortministro" kaj eĉ sukcesis akordigi la du tendencojn en Esperantoto: la konservativan kaj la novigeman. Tion li faris per la granda verko, per kiu li brile kronis

sian vivon, per la Plena Vortaro de Esperanto. Lia "Plena Vortaro" fariĝis fortika gardanto de la lingva unueco. Grosjean-Maupin traktis Esperanton filologie kiel maturan, vivantan lingvon.

Gaston Waringhien

Gaston Waringhien, kiu sin konfesas en la leksikologio disĉiplo de Grosjean-Maupin, estis ankaŭ licea profesoro. Li naskiĝis 29 jul 1901 en Lille. Gvidis kursojn, estis kunlaboranto de revuo "Literatura Mondo", kie aperigis krom recenzoj kaj literaturaj studoj poemojn originalajn kaj tradukitajn el Heine, Baudelaire, Hugo ktp. Liaj tradukoj montras artan lingvon, perfektan transdonon de sento kaj penso. Li aktive interesiĝis kaj okupiĝis pri poeziaj demandoj, la rezultojn de siaj studoj li resumis en sia "Skizo de Esperanta metriko", aperinta en la libro "Parnasa gvidlibro" (1932) kiun li verkis kune kun Kalocsay. G. Waringhien estis ankaŭ kunaŭtoro de la "Plena Gramatiko". Lia literatura verkado apartenas plie al la trfa literatura periodo.

Raymond Schwartz

En Raymond Schwartz la esperanta mondo trovis sian humoriston. Nekontestebla estas lia spirito, lia ideoriĉo, akre trafaj karakterizoj kaj majstra lingvoposedo.

Raymond Schwartz, franco, estis bankoficisto. Li naskiĝis 8 apr 1894 en Metz. Tie li fondis en 1913 esperantan gazeton "Amika Rondo". Jam en 1912 li publikigis rimaĵojn. Ekde 1920 li gvidis dum kelkaj jaroj la faman literaturan kabareton "Verda Kato" en Parizo. Post la dua mondmilito ĝi nomiĝis "Tri koboldoj" (1944-1956).

Ekde 1933 li redaktis la monatan spiritgazeton "La Pirato"

En "La Pirato" li estas vere la "terura infano" de la Esperanta familio: nenio restas kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgas, se kiu aŭ kio estas inda je grimaco aŭ pinĉo. Sed pinĉante per moko, samtempe li tiklas per spirito, tiel ke la pinĉinto mem devas ridi anstataŭ indigni" — skribis K. Kalocsay.

Liaj versaj verkoj "Verdkata Testamento" (1926) kaj "La stranga butikoj" (1931) entenas kanzonojn laŭ kabareta stilo, ironian prezenton de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, spritajn vortludojn. Denove ni citu K. Kalocsay, kiu skribis: "Ĉio ĉi prezentita per perfekta verstekniko, montras lin simpatia bohemo, havanta tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de la vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto, sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita". La samaj kvalitoj distingas liajn prozajn skizojn kaj noveletojn, aperintajn en lia "Prozo Ridetanta" (1928). Lia mallonga romano "Anni kaj Montmarteu" (1930) rakontas la danĝerajn aventurojn de nava germana knabino en Parizo kaj estas la verko per la akre trafa karakterizo, simpla kaj natura prezentmaniero.

En la tria literatura periodo aperis lia romano "Kiel akvo de l' rivero" (1963), en 1971 estis eldonita lia novelkolekto "Vole... novele" kaj aliaj.

Je lia memoro anonima donacinto fondis en 1975 "Premion" de R. Schwartz".

Ido - planlingvo, farita de Beattfront kaj Couturat kiel reformita Esperanto.

La Ido-gvidantoj celis anstataŭ la liberan evoluon de la lingvo per regularo fare de la Akademio, konsistanta el limigita grupo de kompetentuloj.

Ekzistis de 1907 ĝis 1927 kaj plene fiaskis.

Raymond
Schwartz

Pri kartoj migrantaj

La progreso estas nehaltegebla. Tial ni progresas. — La antikvaj Egiptoj konis nur dek plagojn. Interterpe ni eltrovis multajn aliajn. Kaj inter ili troviĝas la mirinda poŝtkarto.

Ĉu vi, feliĉa homo, ne scias, kio estas migranta poŝtkarto? Jen: je l' unua vido ĝi aspektas nadanĝera, sed, se vi bone rigardas, vi facile konstatas, ke tiu poŝtkartformata kartoneto havas lokon por ses adresoj, kelkfoje eĉ por dek!

La regulo de l' ludo estas simpla. La inicianto sendas la karton al iu adreso en iu lando, prefere al nekonato. La ricevanto, post grumblado, malbenado, sin venĝas sendante la karton al alia lando, laŭ la sama regulo, kaj tiel plu, ĝis kiam la antaŭlasta bonvolos sendi la mikrob-kolektan kartoneton al la unua sendinto.

Tio estas tre amuza, precipe por la inicianto, ĉar per unu sola karto li povas sen risko kaj sen granda elspezo tedeĝi ses aŭ dek tute pacajn homojn.. Tion oni nomas "pura ĝuo".

Antaŭ kelkaj tagoj ankaŭ mi ricevis tian karton. Kompreneble, pri tio mi estas juste fiera. Ĉu tio ne pruvus, ke iu pensis pri mi aŭ... trovis mian nomon en malnova jarlibro de UEA? — Tio pruvus, ankaŭ, ke Esperanto vere vivas, ĉar similaj insektoj ne prosperas sur korpo mortinta.

Kontraŭe al miaj ĝenerale ne malbonaj principoj, mi ne ĵetis la mikrob-kartoneton en la paperkorbon. Mi plusenĝis ĝin al bona amiko, kiu ankaŭ siaflanke ofte tedis min!

Kiam mi estis juna (kaj bela), freŝe bakita samideano, antaŭ kvaronjarcento, ankaŭ mi infektis la homaron per tiu stranga sporto. Dekduon da tiaj kartoj mi dissendis tra la mondo. Kaj jen... unu tagon unu revenis. Malpurega, makulhava, glorkovrita, kiel Napoleona grenadisto post la ruslanda militiro, kun multaj medaloj, t.e. kun markoj el dek diversaj landoj kaj kun samtiom da diversnaciaj sekiĝintaj saliveroj. Ĝi estis la plej bela peco en mia muzeo. Miaj lernejkunuloj, fervoraj filatelitoj, pro ĝi min enviegis. Sed tiom migrema estis mia karto, ke iun tagon ĝi malaperis el mia kolekto. Kiam oni havas la kutimon migradi...

Mi devas aldoni, ke miaepoke oni eldonis pli belajn kartojn ol nun. La ekzemplero, kiun antaŭ nelonge mi ricevis, estas apenaŭ pli dika ol cigaredpapero. Mi miros, se ĝi eltenos vojaĝon tra ses landoj. Krom tio, en la klariga teksto troviĝas tiom da lingvaj nekorektaĵoj, ke unu sola akademiano ne sufiĉus por ilin nombri; kaj se oni komisiis por tiu laboro du akademianojn, estas timinde, ke ili aldonos ankoraŭ kelkajn pluajn (kvankam tre originalajn) erarojn. Do? ... Do?Do, ŝajnas, preferinde akcepti saĝan konsilon: Neniame uzu migrantan poŝtkarton kontraŭ homo, kiu aknaŭ siaflanke neniame faris malbonon al vi.



Svedana Naumoviĉ [TUMENO, Ruslando]

Rusaj popolaj fabeloj

Kompilis kaj prilaboris *A. N. Tolstoj*

Esperantigis **Jelena Jaroŝenko**,

[VOLGODONSK, Ruslando]

Kokineto kaj koketo

Vivis iam kokineto kaj koketo.

Venis ili en la arbaron nuksojn rikolti.

La koketo ekgrimpis sur la nukсарbon kaj al la kokineto ordonis sur la tero ilin kolekti.

La koketo ĵetas, sed la kokineto levas.

Jen ĵetis la koketo nukseton kaj trafis al la kokineto en la akuleton.

La kokineto foriris — ekploris.

Preterveturis la kokineton grava sinjoro kaj demandas:

— Kokineto, kokineto! Kial vi ploras?

— Al mi la koketo en la okuleton per nukso trafis.

— Koketo, koketo! Kial vi per nukso trafis en la kokinetan okuleton?

— Al mi la nuksoarbo pantaloneton disŝiris.

— Arbo, arbo! Kial vi al la koketo pantaloneton disŝiris?

— Min kaprinoj ĉirkaŭmordetis.

— Kaprinoj, kaprinoj! Kial vi la nukсарbon mordetis?

— Nin la paŝtistoj ne gardas.

— Paŝtistoj, paŝtistoj! Kial vi la kaprinojn ne gardas?

— Nin la mastrino per flanoj ne mangigas.

— Mastrino, mastrino! Kial vi la paŝtistojn per flanoj ne mangigas?

— Sed ĉe mi la porkino la acidas paston forverŝis.

— Porkino, porkino! Kial vi ĉe la mastrino la acidan paston forverŝis?

— Ĉe mi la lupo porkideton forportis.

— Lupo, lupo! Pro kio vi ĉe la porkino porkideton forportis?

— Ĉar mi ja manĝi ekvolis!



Nina Vinnikova

[N-ALTAJSK, Ruslando]

Esperantigis **Margarita Zujeva**
[MOSKVO, Ruslando]

Fablo de Ezopo

Lupo kaj sciuro

Sciuro saltis de branĉo al branĉo kaj falis sur dormeman lupon. La lupo rapide leviĝis kaj volis formanĝi la sciuron.

La sciuro komencis plendi:

— Lasu min!

La lupo diris:

— Bone, mi lasos vin, nur vi diru al mi: kial vi sciuroj estas tiel gajaj. Al mi ĉiam estas enue, sed mi rigardas vin - vi ĉiam super ĉiuj saltas kaj ludas.

La sciuro respondis:

— Antaŭe, lasu min sur la arbon, kaj de tie mi al vi rakontos, sed ĉi tie mi timas vin. La lupo lasis la sciuron, la sciuro saltis sur la arbon kaj de tie diris:

— Al mi estas tiel enue, ke vi malbonas. Al vi malico koron bruligas. Kaj ni estas gajaj tial, ke ni estas bonaj kaj al neniu malbonon ni faras.

Esperantigis el la rusa **Vladimir Sajtgarajev**
[Jujno-SAĤALINSK, Ruslando]

Fabeloj de afrikaj popoloj

Saĝa koko

fabelo de la popolo hausa

Iris foje koko al siaj parencoj por festeni. Kaj laŭvoje renkontiĝis kun kato.

Ruza kato pensas: "Estus nemalbone formanĝi kokon!" Sed mem diras:

— Kien vi direktas vin, koko?

— Festeni naskiĝdaton de mia onklo, - respondas la koko.

— Tiel iri ni kune, duope estas pli gaje, - proponis la kato.

La koko konjektis pri la malbona intenco de la kato.

— Ne, se vi iros kun mi, tiam ni estos triope. La hundo ankaŭ volis iri al la festeno.

La kato ektimis. Ĝi ankoraŭ trapasis nemulte antaŭen kaj subite haltis.

— Mi ne havas tempon! Mi havas multe da aferoj!

Tiel inĝenia koko eskapis de la kato.

Naila Sadretdinova [TAŝKENTO, Uzbekio]



Pri hieno, kiu scipovis kalkuli ĝis dek

fabelo de la popolo fulbe

Iris foje hieno kaj renkontis homojn, kiuj ĵus buĉis bovinon.

— Donu al mi viandaĉon! - ekpetis la hieno.

— Se vi scipovos kalkuli ĝis dek, ne prononcante la vorton "unu", tiam ni donos, - respondis la homoj.

La hieno nemulte pensis kaj diris:

— Sekve, se mi kalkulos ĝis dek, nedirante la vorton "unu", tiam ricevos viandon?

— Nepre ricevos.

— Jen staras du kaprinoj kaj kokino, diris la hieno. — Rigardu, ĉu ne estas ĉe ili kune dek kruroj?

— Jes, dek, - konsentis la homoj kaj regalas la hienon per viando.

Kiel aperis steloj?

Fabelo de buŝmenoj


En la delongaj tempoj vivis fraŭlino. Unufoje ŝi prenis la pllenmanon de cindro el lignofajro kaj forjetis ĝin sur la ĉielon. La cindro disŝutiĝis tie, kaj en la ĉielo aperis Stela vojo. De nun tiu hela Stelvojo riokte lumigas tenon per mola lumo, por ke homoj revenus hejmen ne en la plena mallumo kaj trovus siajn domojn.

Sed kiam sunleviĝis, Stelvojo blankiĝis, ĝiajn stelojn senkoloriĝis kaj malaperis.

La Suno foriras, refoje aperas Stelvojo, kaj denove ĝi defilas? Laŭ malnovaj spuroj. Kaj tiel la Suno kaj la Stelvojo iras unu post la alia ĉirkaŭ la Tero.

Por ke la Stelvojo ne enuu nokte, la fraŭlino forjetis en la ĉielon dolĉajn radikojn, kiujn la patrino donis al ŝi por manĝi. Sed la fraŭlino ekvidis la enuantan Stelvojon kaj rifuzis manĝi la dolĉajn radikojn. Ŝi ĵetis la radikojn al la ĉielo, ke ili brilu kaj donu ĝojon al la Stelvojo kaj prilumu la vojon al ĉiuj noktaj vojaĝantoj!

Bill Thorne, [LONDONO, Britio]



HORIZONTALA:

1. Senproblema 4. Granda farma birdo 5. Spaco sur tero 6. Fordon', donac' 7. Pli ol sufiĉa 9. Tenilo de poto, kruĉo... 10. Interne 11. ...is = fiksaranĝis la kargon de ŝipo 12. Mekanika elstara elemento sur rotacia akso por periode puŝi aliajn elementojn de maŝino... (vidu bildon) 13. Tre granda dolĉa sukplena fruktoplanto.

VERTIKALE:

1. "...ata" de far'. 2. Loko kie suferas kondamnitaj animoj de la pekuloj. 3. Sovaĝa porko. 6. Adverbo de... osto. 8. Elemento, fragmento. 9. Best' 10. Malgranda 11. Skiz', plan', skelet', diagram'... 14. Filo de frato 15. Sieĝi, persekuti, trudi... > substantivo el tiu verbo



Katja Nosova

[USOLJE-Sibirskoje, Ruslando]


Fina parto de ĉiu vorto estas komenca parto de la sekva

1 Riĉulo havas multe, malriĉulo preskaŭ ne havas 2. Oni povas ĝin kalkuli 3. Per ĝi oni purigas 4. Matenaj malgrandaj akvogutoj sur plantoj 5. Sezono 6. Detruo de grundo rezulte de vento kaj pluvo 7. Elektra korpusko 8. Parto de diurno 9. Bruo post fulmo 10. Ampleksa literatura verko 11. Ĉiu homo havas ĝin

Viajn respondojn al la enigmoj bonvolu sendi al la redakcio ret- aŭ ordinara poŝto



Elena Koneva [BEREZI, Ruslando]



Bonvolu vertikale enskribi elementojn de esperantaj reguloj.

Rezulte de la korektaj respondoj en la supra linio devas esti la samaj literoj. En la malsupra linio vi legos la plej vaste uzatan esperantan verbon. Kaj en la meza linio vi legos vorton, kiu rilatas al tiuj elementoj.

1. Paro 2. Fragmento 3. Nuno 4. Inklino al io 5. Pasisiva participo 6. Malgranda 7. Nedifinita 8. Komenco 9. Estonto


Margarita Zujeva
[MOSKVO, Ruslando]

el Bill Thorne **Kuraĝe kaj kurtaĝe**

Mia garaĝo
por aŭto kaĝo
sur deka etaĝo
kvazaŭ miraĝo.

*
Papago sidas sub flago
Lia imago - zigzago:
matena spektaklo - blago,
Taga spektaklo - frago,
vespera spektaklo - lago.

*
Estu miraĝo eĉ super maro,
Sed kurtaĝo — en realo.



Anice Szrajbnan

LONDONO, Britioj



Bill Thorne
RIMARO

AFO
epitafo
fotografo
grafo
ĝirafano
kafo
karafo
lafo
pafano
parafo
ŝafo

AMO
aklamo
amo
anagramo
balzamo
damo
dinamo
dioramo
dramo
famo
flamo
gamo
gramo
hipopotamo
iamo
inflamo
Islamano
mamo
ornamo
panoramo
pramo
ramo
reklamo
samo
skvamo
teamo
tramo
vigvamo

Maskerado

En parko estas maskerado.
Apud lago estas estrado. Super la
lago la tutan tagon libeloj strekas
zigzagojn. Papago Dodo agrable
pasigas la tempon kun kamaradoj.
Kia domaĝo! Ilia kaĝo estis
damaĝita kaj knabo ne povis ilin
liberigi. Li domaĝas papagojn.
Oni regalis papagojn per
marmelado kaj ĉokolado.

Jen laŭ la pado al domo kun
balustrado tra fasado ekpaŝas
kavalkado, antaŭe mikado (saĝa
vizaĝo), aŭtentika invado de
kavaliroj, parado, kun sintezaj
spadoj kaj klaboj, sed kun granda
plado da ĉokolado.

Domo havas flageton, ĉi tie
estas stabo de maskerado.

Sur estrado — ŝaradoj,
baladoj, serenadoj. Irado de festo
altiga, kiam estradon ekposedas
en blokado ringo de belaj
fraŭlinoj.

Vespere super la estrado
ekhumis miraĝo de buntaj fajroj;
ĉiuj kantas, eĉ papagoj.

Organizantoj de maskerado
perlaboris bonan kurtaĝon.



[VERĤOTURJE, Ruslando]

Aleksandr Šulepov

Barikado el ĉokolado

Tie sidas papago
Lin logas estrado!
Ŝarado kaj balado
Kamarado de P papago —
mikado.

Serenado sonas por mikado
Sed ĉi tio ne serenado —
kanonado el sonoj de lado!

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

AFORISMOJ

“Ve...” estas
velkinta “Hura!”

Tradukis el la kolekto de populara rusia gazeto “Argumentoj kaj faktoj”.

Sergeo Paŝomov,
[KIROV, Ruslando]

Se forestas la kulpuloj, ili do jam troviĝas ĉe la potenco.

Potenco malbonigas homon, sed senpotenco malbonigas la popolon.

Se ne ekzistus popolo, la registaro havus neniujn problemojn.

Kiel ajn malbone ni parolus pri la registaro, ĝi opinias pri ni eĉ pli malbone.

Persona vivo de Prezidento estas ĉies afero.

Vodko estas malamiko de la popolo, sed la popolo ne timas malamikojn.

Kiam mono sufiĉas, estas facile konsenti, ke filiĉo ne estas mono.

Prezoj kvazaŭ serpentoj rampas kaj mordas.

Prezoj estas kvazaŭ fremdaj infanoj: ili kreskas nevideble, sed rapide.

Por kelkaj estas ĉio, por aliaj nur restantaĵo.

Ŝpari monon por tiel nomata “nigra tago” por multaj homoj ne permesas foresto de blankaj tagoj.

Elena Jakovleva

[ARĤANGELSK, Ruslando]

Kiam honte esti riĉa kaj fama

En la lando de nejusteco honte esti riĉa kaj fama, ĉar ĉiuj opinias, ke tiuj kvalitoj estas akiritaj per malhonestaj rimedoj.

Bono kaj malbono

Ĉe Konfucio oni demandis: “Ĉu eblas al malbonkoro respondi per bono?” Li respondis: “Al malbono devas respondi justeco, sed al bono - per bono.”

Margarita Zujeva

[MOSKVO, Ruslando]

Mi ofte renkontas lin

Li estas kun libro ĉiam

Sed personan penson —

Nek... nek..., neniam.

Erkko Mäki

[HYVINKÄÄ, Finnlando]

Astronomoj trovas sur la ĉielo multe da steloj, sed mi ne komprenas, de kie ili scias la nomojn de tiuj steloj?

Leĝo kaj krimo

La vivo konfirmis: ju pli multas leĝoj, des pli multas deliktuloj. Ju pli forte la popolo obeas tradiciojn, des pli malmultas deliktintoj. Oni atingis, ke leĝoj transformiĝu en kutimojn, tiam malaperos krimoj.

Bono ne povas soleci

Virta homo neniam solas - nepre troviĝos samideanoj kaj subtenos lin. Bono altiras al si homojn, sed malbono male forpuŝas ilin de for de si.

Pol Bregg

La plej granda peko - timo

La plej bona tago - hodiaŭ

La plej granda eraro - parolo de espero

La plej granda riĉeco - sano



Aleksandr Šulepov [VERĤOTURJE, Ruslando]

ANEKDOTO

Kolektis el hungarlingva ĵurnalo kaj esperantigis

Rudolf Zoldoš
[KANJIZA, Jugoslavio]

— Imagu, ĝis kiam mia edzo estis en fremdlanda oficvojaĝo, mi eklernis kuiri.
— Fantastiko! - Kaj kion li diris pri tio?
— Nenion interesan, sed de tiu tempo li konstante estas en fremdlando...

— Keĥero! Ĉi-tiu manĝo estas tiom brulgusta, ke mi ne povas ĝin manĝi! Voku ĉi-tien la ĉefon!
— Estas sencele, ĉar ankaŭ li ne povos manĝi ĝin...

Maljunulino iras surstrate apogiĝante sur biciklo.
— Kien vi rapidas, panjo? - demandas ŝin policano.
— Al la tombejo.
— Jes, mi komprenis, sed kiu redonos vian biciklon?

Margarita Zujeva
[MOSKVO, Ruslando]

DIALOGOJ

— Ĉu estas problemoj kun mono?
— Kun mono ne estas problemoj, *sen* mono estas problemoj.

— Pruntedonu al mi 100 rublojn.
— Mi kun mi ne havas.
— Kaj hejme?
— Hejme ĉio bonordas. Dankon. Ĉiuj estas sanaj

— Por kio via filo studas muzikon?
Li ja ne havas muzik-aŭdo-kapablon!
— Mi volas, ke li ludu, sed ne atskultu!

— Ĉu efektive trinki pokaletan de vino antaŭ manĝo estas malutile?
— Ne, certe. Nur ne manĝu tro ofte.

— Mi deziras pantalonon.
— Sinjoro, tio estas vendejo por vegetaranoj.
— Mi ja estas vegetarano!

En lernejo.
— Ĉu vintre kreskas terpomoj?
— Ne, nur prezoj por ili.

— Najbaro, via hundo persekutis iun homon sur biciklo.
— Estas ne mia hundo, mia ne scipovas bicikli.

— Por plibonigo de digesto mi trinkas bieron, por apetito - blankan vinon, dum malalta sangopremo - la ruĝan, dum pli alta - konjakon.
— Kaj la akvon?..
— Tian malsanon mi ne ankoraŭ havas.

Aleksandro Ŝulepov
[VERĤOTURJE, Ruslando]



Tri ebriaj viroj rampas laŭ fervojo.
— Tamen la ŝtuparo ne tre oportunas...
— Jes, kaj la balustrado estas larĝa...
— Kaj jen, rigardu, la lifto proksimiĝas.

Geedziĝo. La pastro al la fianĉo:
— Ĉu vi konsentas edziĝi je tiu fratlino?
La fianĉo:
— Ĉu vi povas proponi ion pli bonan?

Olga Smirnova
[VOLGOGRAD, Ruslando]

Vakero rajdas sur ĉevalo kaj vidas riveron. Li diras: "Mi estas vakero, mi transsaltos la riveron!" Farite.

Plu kuradas la vakero, vidas alian riveron, diras: "Mi estas vakero, mi transsaltos la riveron!" Farite.

Plu rajdas la vakero, renkontas tre vastan riveron.

"Mi estas vakero, mi transsaltos la riveron!"

"Vi estas vakero, tial vi saltu mem!" - respondas la ĉevalo.


La pasagero aeroplano flugas super la zovaja arbaro. Iu pasagero vokas stervardinon kaj petas ellasi lin eksteren. Tiu respondas, ke la aeroplano nun flugas ĉe 10000 metroj super la tero, ke li disbatigos ĝismorte ktp ktp. La pasagero insistas.

La stervardino kontaktas piloton.

— Ĉu estas pasagero kun lambastonoj? - demandas la piloto.

— Jes.

— Lasu lin, li ĉiam eliras ĉi tie.



Anna Kornjuĥina [SUZUN, Ruslando]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

s-ro *Spart Tjulaĥov*
34 jara, tre deziras korespondi kun geesperantistoj, ŝatas legi ktp

Orosu
Verhnevilujskij ulus
Jakutio, 678230
Ruslando

s-ro *William Sellwood*
49 ja., instruisto, ŝatas korespondi pri ĉiuj temoj tutmonde

14, Badgers Holt,
Longstanton,
Cambridge, CB4 5DE
Britio

Koreaj esperantistoj
novbakitaj volas korespondi kun nekoreaj samideanoj rete.

Lee Jungkee
esperanto@unitel.co.kr.

s-ro *Alekseo Pankratov*
26 jara juristo volus trovi amikojn el ĉiuj landoj, por praktiki Esperanton

P.O.Box 1297
Kirovo-Ĉepetsk - 4
RU-613044
Ruslando

Ĉinmedicinaj Kuracejoj
kunfondos en via regiono kune kun vi altnivelaj ĉinaj kuracistoj

Zhiyuan Internacia Kompanio
Huangcengnanlu Xigan
29-602,
CN-710068 Xi-an,
Ĉinio



f-ino *Ingrida Briede*

30-ja., e-istino kun animo romantika deziras, ke 1000000 da esp-istoj povus reagi al ŝia invito, rakontante, kie kaj kiel ili pasigis la jaron 2000.

Filozofu str., 69,
13 nod., Jelgava,
LV-3001,
Latvio

Aktiva EsperantoKlubo
el HELSINGBORG,
(suda Svedio)

por siaj geklubanoj serĉas korespond-amikojn en diversaj aĝoj kaj seksoj.

Nia klubo ankaŭ havas propran dometon kun ĝardeno kaj volonte akceptas gastojn inter aprilo-novembro.

Tel.:
+46-42-15-59-69
rete:
titt@telia
esperanto@sverige.nu

letere:

Aktiva E-Klubo
Rangvallagatan 30 C,
Helsinborg
SE-2566 63
Svedio

Anjo Mattson

kun samideanoj (pli ol 45 j-aĝaj) per ordinara poŝto pri muziko, lingvoj, studado, vojaĝoj, korpokzercoj kaj dombestoj.

P.O.Box 545, Green Valey,
AZ-85622, Arizona
USA

João de Deus F.Araujo
kun virinoj el div. landoj. Int. Pri artikoloj pri Esperanto en angla kaj hispana lingvoj.

ONE 27, Lote 23, Apt 201
72125-270, Taguatinga Norte
Brasilia — DF

Brazilo

Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ

por konverti surogatajn literojn de unu tipo al alia (cx, ^c, c^...), havigu al vi senpagan makroon de:

derksesp@cs.com

KOMENCANTO

2002

16 paĝoj

kolora kovrilo

famaj esperantistoj

historio de E-literaturo

gramatiko serioze kaj ŝerce

amuzaj rakontoj

proverboj, aforismoj

anekdotoj

adreso

multaj multaj bildoj

*Viaj mondonacoj por KOMENCANTO
estas ĉiam bonvenaj. Dankon!*

